

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №11



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №11 (289)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 65-66.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №11 (289).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 ноября 2018 г.

© La Ondo de Esperanto, 2018

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Intervjuo.....5

Intervjuo kun Sten Johansson. “Estas mirinda afero, ke ekzistas Esperanto-literaturo” (Intervjuis Paweł Fischer-Kotowski)	6
Originalaj verkoj de Sten Johansson en Esperanto.....	9

Eventoj10

Horst Vogt. Ilona Koutny ricevis la Esperanto-Kulturpremion de FAME-fondaĵo	11
Matthieu Desplantes. La unua internacia lingva festivalo en Slovakio	13
Aleksandr Blinov. Lingva Festivalo: Jam la 23a en Ĉuvaŝio.	14
Edmond kaj Arlette Plutniak. Post 11-jara paŭzo denove en Arras	16
Katerina Arbekova. La trian fojon en Novosibirsko.....	16
Salomé Hug. KAESt festis sian 40-jariĝon	17
Maia, Gobbo kaj Ward de Kock en la Malferma Tago	18
Hotta Yuri. Japanio-Koreio: Komuna kongreso kun pli ol kvincent aliĝintoj	19
Libuše Hýblová. Konferenco en Ĉeĥio.....	20
Rafał Mościński, Małgorzata Sopińska. Ĉelime kaj junulare en Katowice	21
Vanja Radovanović. MKR: Je pli ol 2500 metroj super la marnivelo!	22
Alois Eder. BAVELO: Rekorda partoprenantaro.....	23
Aristóphio Alves Filho. Seminario por esperantistaj kursgvidantoj.....	24
Abengo. Kiel sveda esperantisto vizitis Tajvanon	26
Fritz Hilpert. Munkeno: Ora Jubileo je Oktobrofesto	27
“Vivanta naturo, floranta kulturo”: kongresa temo de la 104a UK	28
Ekskurso tra la tri baltiaj landoj: Litovio, Latvio, Estonio	29
Povilas Jegorovas, Aleksander Korĵenkov. BET-55: Lernu kun Anne Jausions	32
<i>Ekvinokso</i> koncertos en BET-55	33
Povilas Jegorovas. BET-55 sub la aŭspicio de UEA.....	34
Koncize (12 informoj)	35

Tribuno36

Mesaĝo de UEA okaze da la Tago de Unuiĝintaj Nacioj	37
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto	37
Lu Wunsch-Rolshoven. Deklaro pri Esperanto en Eŭropa Unio	38
Proksimas la (papera) morto de la UEA-revuoj.....	39
Seŝimo Masaja. Renkontiĝo en Dubajo, ĉu fiasko? Ne!	40
Pavla Dvořáková. Dek jaroj de la Esperanto-Muzeo en Svitavy	41

Arkivo	45
Ulrich Lins. Ĉu nova mondo post la milito?	46
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en novembro 2018.....	54
Kulturo	55
Halina Gorecka. La tatara verkisto Gajaz Iŝakov.	56
Gajaz Iŝakov. La galoŝoj: Fragmento (Tradukis el la tatara Jusuf Kazakov).....	56
Wolfgang Kirschstein. Talento kaj gusto	58
Laure Patas d'Illiers. Serena krimromano (Recenzo: Julian Modest. <i>Serenaj matenoj</i>) ..	60
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>La Ondo de Esperanto</i> en 2019.....	61
Flo! Bita eldono de <i>Tute ne gravas</i>	62
La 45a programo de <i>Radio Esperanto</i>	62
<i>Literatura Foiro</i> , 2018, №295	63
Ricevitaj gazetoj	63
Mozaiko	64
Solvo por la oktobra krucvortenigmo	65
Foje en lernejo	65
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	66
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	67
 Kovropaĝo: Bella Devjatkina – sesjara Ruslanda knabino, parolanta ok lingvojn – estis unu el la plej rimarkindaj (kaj rimarkita de intervjuistoj) personoj en la unua Lingva Festivalo en Slovakio. (Foto: Jozef Baláž)	

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Intervjuo



Sten Johansson [pron.: Júhanson] estas aŭtoro de dudeko da originalaj novelaroj kaj romanoj, inter kiuj ankaŭ facilaj legaĵoj. Li kreis kaj redaktas la retejon “Originala Literaturo Esperanta” (OLE), verkis plurajn recenzojn kaj literaturajn eseojn. Ofte premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĉi-jare aperis lia nova romano *Marina ĉe la limo*.

Estas mirinda afero, ke ekzistas Esperanto-literaturo

Intervjuo kun Sten Johansson

Kiel okazis, ke vi komencis verki en Esperanto? Ĉu vi verkis pli frue en via denaska lingvo?

Mi unue provis verki svede, sed trovis nek temojn nek bonan stilon. Esperanto fariĝis ia prova tereno por mia verkado, kaj poste mi dum periodoj verkis alterne aŭ paralele svede kaj esperante, precipe novelojn.

Vi verkas ankaŭ en facila lingvaĵo. Ĉu el la vidpunkto de verkisto tio estas pli aŭ malpli facila ol kiam oni verkas en “normala” Esperanto?

Estas pli malfacile verki facile. Mi lernis tion iom post iom. Parolante pri facila lingvaĵo oni ofte atentis nur la nombron kaj oftecon de vortoj aŭ radikoj, sed same aŭ eĉ pli grava estas simplaj, klaraj frazoj kaj intrigo facile sekvebla. Kaj mi konstatis kontraŭvole, ke almenaŭ por mi la simpla lingvaĵo foje influas ankaŭ la enhavon kaj donas al tiu ian naivan trajton. Sed tiam mi klopodis konscie uzi tiun trajton kiel stilan rimedon.

Lastatempe vi regalias la publikon per nova romano ĉiun duan jaron, ĉi-jare la eldonejo *Mondial* surmerkatis vian novan romanon eĉ pli frue, nur unu jaron post la antaŭa. Ĉu vi intencas teni tiun rapidan ritmon?

Nu, tio dependas de inspiro, kapablo kaj – eldonisto, ĉu ne? Mi nun laboras pri nova romano, kiun mi eble finos en 2019, sed neniun certeco ja ekzistas.

Kiel vi laboras pri novaj verkoj? Ĉu, kiel multaj verkistoj, vi havas iujn kutimojn aŭ ritojn ligitajn kun la elpensado de intrigo kaj verkado? De kie venas ideoj por viaj noveloj kaj romanoj?


Ritojn ne (krom eble ke mi ŝatas skribi mane en ĉina notlibro kun silka kovrilo, ofte en kafejoj). Por la intrigoj mi ne vere scias, de kie origine aperas la ideoj. Iufoje mi verkas laŭ klara plano, aliffoje pli spontane. Sed mi ĉiam multege pri-laboras, ŝanĝas, aldonas, redaktas, kaj mi ĉiam poste petas konsilojn kaj kritikojn de bonaj provlegantoj, ne nur pri la lingvaĵo sed ankaŭ pri intrigaj aferoj, se eble.

Ĉu ankaŭ opinioj de ordinaraj legantoj influas vin? Ĉu vi havas kontakton kun la publiko? Estas nature, ke por E-verkisto tio estas malpli facila. Kiel tio aspektas en via kazo?

Bedaŭrinde, mi havas malmulte da kontakto kun legantoj, sed kiam mi ricevas komentojn, tio ja ĝojigas min. Ĉu ili influas la pluan verkadon, mi ne povas diri. Verŝajne tio validas ĉefe en la okazo de provlegantoj, eble iufoje ankaŭ pro trafa recenzo.

Kaj kiomgrade la vera vivo servas kiel inspiro por via fikcio, ekzemple en *El ombro de l' tempo*?

Jam delonge mi klopodas ekspluati proprajn sentojn, memorojn, dilemojn ktp sen planti ilin en plene fikcian rakonton. Ĉar mi verkas en realisma ĝenro, tiun rakonton mi spicas per detaloj el la realo, ĉu el propraj travivaĵoj, ĉu alimaniere trovitaj, ekzemple per guglado. Krome mi ofte enplektas novaĵojn kaj temojn de la aktuala socio – plej multe en *Marina ĉe la limo*. En *El ombro de l' tempo* mi eĉ pli ol antaŭe uzis proprajn memorojn por la medio kaj detaloj, sed la bazaj intrigo kaj personoj estas same fikciaj kiel kutime. Tamen mi supozas ke ĉiuj miaj protagonistoj enhavas iom da trajtoj el la aŭtora memo, sed tio okazas ne intence sed iel aŭtomate, neeviteble.



Sten Johansson kun sia notlibro (vidu ankaŭ la foton en la 5a paĝo)

Vi kreis la retejon “Originala Literaturo Esperanta” (<http://esperanto.net/literaturo>), kiu sen ajna dubo estas la plej bona fonto de informoj pri la originalaj Esperanto-libroj. Kiam kaj kial vi eklaboris pri tiu projekto?

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Aalen: La urbestro Thilo Rentschler, la prezidanto de FAME Andreas Emmerich kaj la premiitino Ilona Koutny (Foto: Horst Vogt)

Ilona Koutny ricevis la Esperanto-Kulturpremion de FAME-fondaĵo

La 20an de oktobro 2018 la urbestro de la urbo Aalen, Thilo Rentschler, kune kun Andreas Emmerich, la prezidanto de FAME-fondaĵo, transdonis al prof. d-rino hab. Ilona Koutny la renomman kulturpremion de la Fondaĵo Alois Meiners. La premio estas dotita per tri mil eŭroj, kaj ĝin rajtas ricevi personoj aŭ organizaĵoj, kiuj akiris al si meritojn rilate la antaŭenigon de la internacia interkompreniĝo.

La urbestro en la feste ornamita urbodoma salono tre varme bonvenigis la premiatan profesorinon Koutny kaj ŝian koleginon, d-rinon Katalin Kováts, kiu antaŭ du jaroj ricevis la FAME-premion. Aplaudate de la ĉeestantoj, li diris kelkajn vortojn en Esperanto. Rentschler aprezis la laboron por kaj per Esperanto kiel subtenindan kontribuon por la internacia kompreniĝo kaj la venko de lingvaj baroj.

La laŭdparoladon faris Peter Zilvar, la gvidanto de Germana Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo Herzberg (Harcmontaro). Li estas mem unu el la studintoj de la premiitino. Zilvar emfazis, ke la premiitino dediĉis tridek jarojn al la instruado de interlingvistiko kaj esperantologio. Li substrekiĝis ŝian scienca multflankecon, menciante ŝiajn laborojn koncerne parolsintezon kaj pretigon de vortaroj. Kiel grandan meriton de Ilona Koutny, Zilvar elstarigis la fondon de la Interlingvistikaj Studoj kaj ties sindonan daŭran gvidadon dum 20 jaroj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. La eksteraj sessemestraj postdiplomaj studoj ĉefe koncernas ĝeneralan kaj aplikatan lingvistikon, internaciajn lingvojn kaj interkulturan komunikadon, koncentriĝas al la lingvistiko, literaturo kaj historio de Esperanto.

Jam antaŭ la laboro en Poznano Ilona Koutny kiel posteulo de prof. István Szerdahelyi instruis en la Budapeŝta universitato ELTE dek jarojn esperantologion al ĉ. 100 gestudentoj.

Katalin Kováts, gvidantino de la instruista programo de la interlingvistikaj studoj, kiel la antaŭa FAME-premiitino per personaj vortoj varme gratulis sian koleginon kaj iaman instruistinon. Tradukis tion Utho Maier en la germanan.

Ilona Koutny, kiu naskiĝis en Budapeŝto kaj tie en la universitato ELTE studis i.a. esperantologion ĉe prof. István Szerdahelyi, kortuŝite kaj fiere dankis la distingon per la FAME-premio. Ŝi dankis en bona germana lingvo kaj aparte ĝojis pri tio, ke inter la multaj gastoj de la solenaĵo troviĝis ankaŭ kvin el ŝiaj iamaj gestudentoj.

Andreas Emmerich, nuna prezidanto de FAME-fondaĵo kaj ankaŭ iama studento en Poznano, kune kun la urbestro transdonis la premion kaj belan florbukadon.

La tutan solenaĵon, Felix Kögel, fama juna akordeonisto, muzike ornamis per virtuoze prezentataj muzikaĵoj. La solenaĵo finiĝis per abunda bufedo, dum kiu la gastoj havis la eblecon kontakti malnovajn kaj freŝajn gekonatojn.

La aŭtoro de ĉi tiu teksto, mem finstudinto de la Interlingvistikaj Studoj, bone memoras la interesan kaj afablan manieron de la premiitino instrui, defii kaj kuragi nin kaj ŝian tamen severan prijuĝon de niaj studlaboroj.

Horst Vogt

Ni volonte aliĝas al la gratulado de Ilona Koutny, kiu antaŭ dek jaroj ricevis la honoran titolon "La Esperantisto de la Jaro 2008". Brave, Ilona!

**Halina Gorecka
Aleksander Korjenkov**



Foto: Jozef Baláž

La unua internacia lingva festivalo en Slovakio

Lingva festivalo estas publika evento, dum kiu lingvaj institucioj (lernejoj, eldonejoj...) povas prezenti sin, kaj kie la publiko povas senpage ekkoni diversajn lingvojn en prelegoj kaj lecionetoj. Tiaj eventoj okazas interalie en Berlino, Moskvo kaj Minsko, sed ĝis nun neniam en Slovakio. Tio estis ŝanĝita la 28-29an de septembro, kiam okazis en Bratislavo LingvaFest', la unua lingva festivalo en Slovakio. Ĝi estis plejparte organizita de E@I (helpe de SKEF kaj la Ekonomia Universitato), laŭ modelo de la lingvaj festivaloj de Dennis Keefe, kun kelkaj modifoj kaj riĉigo de la programo.

La programo estis efektive tre riĉa: dum du tagoj estis entute 105 programeroj. La vizitantoj povis ĉeesti rapidkursojn de 24 lingvoj, ekzemple, la hispana, franca, rusa, germana, sed ankaŭ malpli ofte lernataj lingvoj (belorusa, daria, taja, hebrea, indonezia, hindia) kaj de konstruitaj lingvoj (klingona, navia kaj Esperanto).

La prelegoj estis tre diversaj: aplikaĵoj por lerni lingvojn, la romaa en Slovakio, kiel vivi kun surdulo, kiel lerni lingvojn tradukante per Vikipedio ktp. Prelego, kiu surprizis eĉ la organizantojn, estis prezento de Filipinoj: knabo flugis el Filipinoj ĝis Slovakio nur por partopreni en LingvaFest' kaj prezenti sian landon tie! Plej multaj prelegoj estis en la slovaka aŭ ĉeĥa, kelkaj estis en la angla. Tre atendita

programero estis tiu kun Bella Devjatkina: ses-jara knabino el Ruslando, kiu parolas ok lingvojn. Ŝi venis de Moskvo kun siaj gepatroj, kaj ŝia patrino Julija klarigis ruse kaj angle, kiel ŝi edukas sian filinon kaj atingis tiun mirindan rezulton.

Ne mankis ankaŭ kultura programo: okazis koncertoj de JoMo, kiun ne plu necesas prezenti en *La Ondo* (li sukcesis kanti en 25 lingvoj!); de Steve Lin, tajvanano kiu kantas slovake, kaj de Suvereno, fama slovaka repisto, al kiu plaĉis la ideo de LingvaFest' kaj li akceptis fari koncerton senpage.

La festivalo ricevis multajn vizitantojn (oni taksas ĉ. 1500 homoj) – ĉefe la unuan tagon, kiam busplenoj da lernantoj venis kun siaj instruistoj. LingvaFest' 2018 estis sukceso kaj okazos denove en 2019. La E@I-teamo jam planas diversajn novigojn, interesajn programerojn kaj specialaĵojn, por kontentigi ĉiujn.

LingvaFest' ricevis sufiĉe buntan atenton de la ekstera publiko – jen ligilo kun kolektitaj artikoloj kaj aperoj en amaskomunikiloj:

<http://www.lingvafest.sk/lingvafest-en-gazetaro/>

Fotogalerion de la evento oni povas trovi ĉi tie:

https://photos.google.com/share/AF1QipOJ0BAWE__RdaRVXa5IUIhpWzR-0PyiqByT-TgsL8gMbgxhgYOGxsyn2eowpyfkhbw?key=M0R4STVNZnAtT0hFUVBIRmpGd3c0dTNSd1FNOFdB

Matthieu Desplantes

Lingva Festivalo: Jam la 23a en Ĉuvaŝio

La 21an de oktobro en Ĉeboksaro (Ĉuvaŝio, Ruslando) en la Ĉuvaŝa Pedagogia Universitato okazis la tradicia 23a Lingva Festivalo. Ĝin ĉeestis pli ol 350 partoprenantoj inkluzive de gastoj kaj prezentantoj el Moskvo, Permo, Uljanovsko, Iĵevsko, Kazano, ankaŭ el Portugalio, Germanio, Svislando kaj Ukrainio. La antaŭfestivala programo estis aranĝita en la Ĉuvaŝia urbo Ŝumerlja, kie ĝin partoprenis pli ol ducent lernejoj.

La festivalo estis organizita de la Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko helpe de la privata lernejo de fremdaj lingvoj, la fakultato de fremdaj lingvoj de la Ĉuvaŝa Pedagogia Universitato, Ĉuvaŝa Nacia Biblioteko, Ĉuvaŝa iniciata grupo “Haval” kaj la volontula centro “Sodruĵestvo”.

Inter la specialaj gastoj estis Julia Evdokimova, reprezentanto de la konsulejo de Italio; Sandra Isabel Lopes Amadu Kroshneva, iama instruisto de la Portugala kulturcentro en Moskvo, fondinto de la kleriga projekto Portulândia; Maria Cvetuhina, ĉeforganizanto de la Perma Lingva Festivalo; Mihail Ĥaminskij, reprezentanto de la Moskva Lingva Festivalo; kaj Artjom Fedorinĉik, organizanto de la Kieva Lingva Festivalo.





Ĉeboksaro: En la festivala koncerto (Foto: Aleksej Maksimov)

Okazis prezentoj de 27 lingvoj: araba, belorusa, montara marea, kartvela, gaela, ivrito, itala, hispana, kataluna, ĉina, korea, ladino, germana, pola, portugala, selkupa, turka, turkmena, ukraina, finna, franca, hinda, ĉuvaŝa, erzja, Esperanto, japana. Esperanto estis prezentita de Pjotr Fedosov (Moskvo), inkluzive de speciala prezento por infanoj, kaj de Massimo Ripani kaj Aleksandr Blinov (Ĉeboksaro). Kaj en Ŝumerlja – Andrej Grigorjevskij. Pli ol 50 personoj ĉeestis la prezentojn de Esperanto.

Krome estis prezentitaj kvar lingvaj sistemoj: Brajla skribo, lingvo de blindosurduloj, rusa gesta lingvo, lingvo de flaga semaforo. Funkciis sep lingvaj lekcioj: “La (angla) lingvo kiu turniĝis je 180 gradoj”, “16 tempoj dum 16 minutoj (de la angla lingvo)”, “Kiel lerni lingvojn” (dufoje de du diversaj homoj), “Kiel ni diras pri spaco (en diversaj lingvoj)”, “Teorio de artikolo”, “Planlingvoj”. Estis prezentitaj du lingvaj programoj: Year Program USA kaj volontulaj programoj de la centro “Sodruĝestvo”.

La festivalon kronis internacia koncerto kun partopreno de profesiaj kaj amatoraj kolektivoj de la urbo. Iom da statistiko pri la vizitantoj: 6-9 jaraĵ (7%), 10-16 jaraĵ (41%), 17-22 jaraĵ (23%), 23-30 jaraĵ (12%), 31-40 jaraĵ (11%), pli ol 40 jaraĵ (7%). Inter ili 72% venis al LF la unuan fojon, 19 % – 2-4 foje, 9% – 5 kaj pli da fojoj.

Aleksandr Blinov

Post 11-jara paŭzo denove en Arras

Post 11 jaroj nia asocio Arras-Esperanto, okaze de sia 25-jariĝo, organizis la duan LingvoFestivalon kun la financa helpo de la NordFrancia Esperanto-Federacio. Ankaŭ la suno sin invitis la 30an de septembro en la bela ĵus renovigita Kultura Oficejo de la urbo. 25 lingvoj estis prezentitaj (po kvin lingvoj ĉiuhore en kvin diversaj salonoj) laŭ la skemo de Dennis Keefe. La lingvo Esperanto estis prezentita sesfoje.

Ni anoncis la eventon per bela profesia afiŝeto, 500 flugfolioj, kvar artikoloj en la loka gazetaro kaj unu longa intervjuo en la regiona radio. La ŝatantoj de lingvoj venis sufiĉe nombraj, ĉirkaŭ 200 personoj, kiuj povis ankaŭ spekti tri ekspoziciojn: “Esperanto dum la unua mondmilito”, “Esperanto kaj la lingvodiverseco”, kaj artaj pentraĵoj de unu el niaj klubaninoj. La libroservo de FEL montris la literaturan riĉecon de nia Esperanto-kulturo.

Vespere brila koncerto de JoMo en 25 lingvoj kronis tiun belan tagon.

Baldaŭ ni malfermos novan kurson. Ĉu ni gajnos 25 komencantojn?

Edmond kaj Arlette Plutniak



La trian fojon en Novosibirsko

La 13an de oktobro okazis la tria lingva festivalo en la Siberia urbo Novosibirsko! La ideo de Dennis Keefe disvastiĝas tra la mondo kaj trovas subtenon de multaj junuloj. Ili aktive vizitas festivalojn, prezentas siajn naciajn lingvojn kaj demonstros siajn talentojn.

La etoso de la festivalo estis tre amika kaj gaja. Dum la tago okazis 44 diversaj prelegoj, estis prezentitaj 26 lingvoj. La turkan lingvon prezentis tre interesa 14-jara rusa knabo, kiu dum tri jaroj loĝis en Turkio. La portugalan lingvon prezentis internacia paro: ruso-brazilanino. Estis prelego pri la keĉua lingvo. La venintoj ĝuis ludojn kaj dancojn dum paŭzoj inter prelegoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Ekskurso tra la tri baltaj landoj: Litovio, Latvio, Estonio

Panevėžys – Nacia parko de Aukštaitija – Vilno – Trakai – Šiauliai – Monto de krucoj – Rundale – Rigo – Tallino – Helsinko – Lahtio (7 tagoj)

14.07. Panevėžys – Molėtai (95 km)

Post la fermo de BET-55 ni forveturos el Panevėžys al Molėtai kaj survoje vizitos etnokosmologian muzeon. Ĝi estas la unua kaj sola tiutipa muzeo en la mondo. Ĝia esenco estas rilatoj de la homaro kun la kosma mondo.

Vespermanĝo kaj tranokto en ripozdomo ĉe lago.

15.07. Molėtai – Ignalina – Vilno (175 km)

Matenmanĝo. Forveturo al la nacia parko de Aukštaitija. Ĝi estas la plej malnova nacia parko en Litovio, fondita en 1974. En ĝi estas pli ol 80 lagoj. De sur montetoj de la parko videblas pitoreskaj lagoj. Unue ni haltos en Ginučiai ĉe malnova akvomuelejo de la 19a jarcento, kiu, laŭ rakontoj de lokanoj, famas pro petolado de diabloj. Ni vidos belegan panoramon de la monteto Ladakalnis, kiun ĉirkaŭas ses lagoj. Ni daŭrigos al muzeo de abelbredado, kie nin renkontos statuo de la abela dio Babilas. Vizitante la ekspozicion, ni konatiĝos kun la abelbredado ekde pratempe ĝis nuntempo, kaj kun diversaj specoj de mielo. Estas interese scii, ke por kolekti unu kuleron da mielo laboremaj abeloj devas “labori” dum unu tago.

Tagmanĝo. Poste ni veturos por ekscii, kiel oni bakas la tradician “dornan” kukon *šakotis*, Vi povos partopreni en la bakado kaj gustumi vian produktaĵon kun kafo.

Forveturo al Vilno. Vespermanĝo kaj tranokto en Vilno.

16.07. Vilno – Trakai – Šiauliai (265 km)

Matenmanĝo. Konatiĝo kun la malnova urbocentro de Vilno – la ĉefurbo de Litovio, enskribita en la listo de heredaĵo de Unesko. Post la ekskurso ni veturos al la malnova ĉefurbo de Litovio – Trakai. Survoje okazos tagmanĝo. La insula kastelo de Trakai, ĉirkaŭita de lagoj, estas unu el la plej vizitataj lokoj de Litovio. Trakai estas hejmloko de la karaima minoritato. Ilin kune kun tataroj en la 14a jarcento venigis la granda duko Vytautas la Granda. La urbeto nun estas parto de la historia nacia parko de Trakai. Trakai famas per karaimaj pladoj *kibinai*. Oni ne povas forveturi sen gustumi ilin.

Forveturo al Šiauliai, la kvara plej loĝata urbo en Litovio. Vespermanĝo kaj tranokto en Šiauliai.



Trakai: unu el la plej pitoreskaj lokoj de Baltio.

17.07. Šiauliai – Rundale – Rigo (130 km)

Matenmanĝo. Konatiĝo kun la urbo. Forveturo al la unika Monto de krucoj, la sola en la mondo kun pli ol 50 mil krucoj kaj krucetoj.

Tagmanĝo. Forveturo al Latvio. Alveno al la palaco Rundale – unu el la plej famaj barokaj palacoj en Latvio. Ĝi estas nomata la malgranda Versajlo. Iam ĝi estis somera rezidejo de la reganto de Kurlando Ernesto Biron. La palacon projektis la fama itala arkitekto F. B. Rastrelli.

Forveturo al Rigo – la ĉefurbo de Latvio. Vespermanĝo kaj tranokto en Rigo.

18.07. Rigo – Tallino (280 km)

Matenmanĝo. Piedira ekskurso tra la malnova parto de Rigo. La urbo etendiĝas ĉe la Riga golfo de la Balta Maro ĉe la riverbuŝo de Daugava. Rigo famas per la secesia stilo (Jugendstil).

Forveturo al Tallino – la ĉefurbo de Estonio. Vespermanĝo kaj tranokto en Tallino.

19.07. Tallino

Matenmanĝo. Busa ekskurso: palaco kaj parko Kadriorg, kantovalo, velŝipa centro Piritu, ruinoj de la monaĥinejo de S-ta Brigita. Piedekskurso en la malnova urbocentro.

Tagmanĝo. Libera tempo en la malnova urbocentro.

Vespermanĝo kaj tranokto en Tallino.

20.07. Tallino – Helsinko – Lahtio (75 km)

Matenmanĝo. Pramvojaĝo al Helsinko – la ĉefurbo de Finnlando. Mallonga konatiĝo kun la urbo: monumento al la komponisto Sibelius, roka preĝejo Tempelaukion, senata placo kun monumento al imperiestro Aleksandro II kaj blanka katedralo.

Forveturo al Lahtio – la urbo de la 104a UK.

Prezo: 715 eŭroj. En la prezo estas inkluzivitaj:

- Busa vojaĝo
- 6 tranoktoj en dultaj ĉambroj kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj
- 5 tagmanĝoj
- Servoj de ĉiĉeronoj kaj vojaĝgvidanto
- Enirbiletoj al pagendaj objektoj
- Eduka programo pri bakado de tradicia litova kuko “šakotis”
- Gustumado de la karaima plado “kibinai”
- Prambileto de Tallino al Helsinko

Pliaj informoj ĉe la La Organiza Komitato de BET-55:

Poŝta adreso: p. k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio

Telefonoj: +370-687-12219; +370-686-69875

Retadresoj: litova.ea@mail.lt; irenaa.alijosiute@gmail.com; pjeorovas@yahoo.com

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



En la oktobra *Ondo* vi povis legi pri la (ne tre sukcesa) provo logi esperantistojn al la paradiza insulo Kreto. Nun ni proponas al vi konatiĝi kun la provo okazigi esperantistan renkontiĝon en Dubajo, la ĉefa urbo de UAE (ne de UEA, ja inter pli ol du milionoj da loĝantoj de ĉi tiu moderna urbego estas neniuj delegitoj de UEA).

Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, Universala Esperanto-Asocio gratulas Unuiĝintajn Naciojn en ties 73a jaro kaj alvokas al parolantoj de Esperanto subteni la laboron de la familio de Unuiĝintaj Nacioj.

UEA, fondita en 1908, restrukturiĝis en la jaroj tuj post la Dua Mondmilito kaj la malvenko de la fortoj de faŝismo kaj genocido. Nia celo, same kiel tiuj de la tiam naskiĝanta organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, estis subteni lingvadon pli ol bombojn, kaj komprenigon pli ol antaŭjuĝadon. Ni daŭre kredas same kiel Unuiĝintaj Nacioj ke paca intertraktado per vortoj parolaj kaj skribaj superas konfrontigon kaj perforton, inkluzivo superas ekskluzivon, kaj diskutado kaj interkonsento estas esencaj por la daŭripovo de la planedo. Ni instigas niajn membrojn, ke ili sekvu la laboron de Unuiĝintaj Nacioj kaj aldonu sian subtenon al ĝiaj iniciatoj por paco kaj kompreno.

GK UEA

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto

Tra la pasinta deko da jaroj, la 2a de oktobro estas regule festata kiel la Internacia Tago de Ne-perforto, laŭ deklaro de Unuiĝintaj Nacioj. En tiu tago ni memoras la elstarajn atingojn de tiuj kiuj per apliko de ne-perforto ŝanĝis la proprajn sociojn laŭ la direkto de justeco kaj egaleco.

Mahatmo Gandhi nomis ne-perforton “la plej granda potenco je la dispoŝo de la homaro” kaj Martin Luther King priskribis ne-perfortan reziston “kuraĝa konfrontiĝo de malbono per la potenco de la amo”.

Universala Esperanto-Asocio aparte rekonas la gravecon de lingva komunikado kiel instrumento de ne-perforto. Per sia kapablo paroli kaj skribi, la homo povas persvadi, insisti, rezoni – kaj ĉion ĉi fari por eviti perfortan konfrontiĝon. Sed tio eblas nur tiam kiam ambaŭ flankoj parolas la saman lingvon. Tro ofte, la komunikado kolapsas pro malsameco de lingvoj, aŭ pro la nekapablo de parolantoj de malsamaj lingvoj adekvate transponti tiujn diferencojn.

La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita por transponti la diferencojn inter lingvoj, formante bazon por ne-perforta komunikado kaj la antaŭenigon de interkompreniĝo. La statuto de UEA asertas, ke “Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj”. Surbaze de tiu statuta postulo, la Asocio nete kondamnas ĉiun specon de perforto – kaj okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto denove deklaras sian sindediĉon, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, al kreo de pli paca kaj pli komprenema mondo.

GK UEA

Deklaro pri Esperanto en Eŭropa Unio

En majo 2019 denove okazos eŭropaj elektoj. Do indas pripensi, ĉu kaj kiel prezenti Esperanton al politikistoj kaj al la ĝenerala publiko.

Mi havas la pli kaj pli certiĝantan impreson, ke granda parto de la publiko kaj ankaŭ de lingvofakuloj havas sufiĉe vastan misan scion pri Esperanto. Iuj kredas, ke ĝi ne havus denaskulojn, ke oni uzus ĝin nur dum kongresoj kaj inter kongresoj apenaŭ aŭ ne, ke la lingvo ne havus vortludojn, havus neniun literaturon nek kulturon ktp. Antaŭnelonge mi ricevis la informon, ke iu kunlaboranto de la EU-komisiono asertis, ke Esperanto estus lingvo sen kulturo...



Fronte al tia antaŭ-misĉio ne eblas ion ajn senchavan atingi por nia lingvo. Se homo estas tiel misinformita, li aŭ ŝi tre kompreneble neniel volas tian Esperanton en iu ajn funkcio por Eŭropa Unio. (Mi duonŝerce nomas la sumon de ĉiuj tiuj eraroj “Esperanto B”, dum la reala Esperanto kun sia lingvokomunumo estas “Esperanto A”).

Mi do havas la impreson, ke indas unue informi la publikon antaŭ ol deklari iujn celojn.

Krome mi havas la impreson, ke multaj el la celoj, kiujn kelkaj Esperanto-entuziasmoj formulas por Esperanto, estas ne vere realismaj nuntempe. Tiel estas laŭ mi ekzemple por la ideo, ke Esperanto fariĝu oficiala lingvo de Eŭropa Unio; simile pri la uzado kiel relaksa lingvo en interpretado; simile ankaŭ pri la ideo, ke Esperanto povus servi interne de Eŭropa Unio. Laŭ mi ni lasu la deklaron de tiaj celoj por iom pli poste – kiam ni estos almenaŭ sukcesintaj informi la publikon kaj la gvidantojn. Se ni daŭre ripetas tiajn dezirojn kaj daŭre malsukcesas, ni restas en la ĝenerala publiko la utopiuloj kaj nesukcesuloj. Tio ne estas dezirinda.

Ni trovu do aliajn celojn. Ekzemple oni povas peti ke Eŭropa Unio dokumentu la Esperanto-uzadon en Eŭropo kaj la staton en la unuopaj landoj. Oni povas peti ke universitatoj subtenu esplorado pri Esperanto kaj ties komunumo. Oni povas peti, ke ĉiu lernejo iam dum sia lerneja tempo estu instruata pri la nuna stato de Esperanto kaj de la Esperanto-komunumo, dum eble du lecionoj – kiel anstataŭaĵo al la ofte aŭdebla kaj ne vere realisma postulo, ke ĉiu lernejo lernu Esperanton.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Post kvar jaroj de terura mondmilito la politikaj cirkonstancoj rajtigas nin nun esperi, ke dum 1919 estos konkludata la paco. Kia ĝi estos, kaj kiaj sekvoj naciaj, sociaj kaj ekonomiaj elkreskos el la nova mondarango, tion neniuj klare antaŭvidas. Tamen estas certe, ke por la ŝtatoj kiel por la privataj entreprenoj multo dependos de ilia lerteco, ĝustatempe rekoni la plej urgajn bezonojn, trovi la taŭgajn rimedojn kaj saĝe kunligi la novajn vivkondiĉojn al la antaŭaj.

La Esperantistaro atendas de la paco gravan plifortigon de la movado. Multaj, bedaŭrinde ne ĉiuj, samideanoj revenos; malaperos almenaŭ parto de la zorgoj kaŭzitaj de la milito, kaj leviĝos la baroj ĉiuspecaj, kiuj tiel malfaciligis kunveni kaj korespondi. De tiuj cirkonstancoj ankaŭ nia Asocio profitos, sed ĝi estas en speciala situacio, kaj pro tio ĝi petas vian konsilon.

La celo de Universala Esperanto-Asocio estas plifaciligi la rilatojn inter la homoj, per la Zamenhofa helplingvo, kaj kreskigi inter ili ligilon de solidareco. Kiel ni jam skribis en „*Esperanto*“, ni estas fieraj pri tiu principo de paca kunlaboro de diverslandaj bonvoluloj kaj ne foriros de ĝi.

Okaze de la fino de la Unua Mondmilito ni aperigas eseon de Ulrich Lins, kiu estas ampleksigita versio de prelego, kiun li faris la 30an de julio 2018 dum la 103a UK en Lisbono kadre de la kongrestema programo “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo – kien nun?”, reĝisorita de Javier Alcalde. (Supre estas fragmento de artikolo aperinta en novembro 1918 en la revuo *Esperanto*.)

Ĉu nova mondo post la milito?

Esperantistoj kaj internaciistoj antaŭ kaj post 1918

En 2014 estis la centa datreveno de la eksplodo de la Unua Mondmilito. Ĝi instigis al multaj memorigaj kaj analizaj studoj, kies ĉefa temo estas la demando de kulpulo. Ĉu la militon kulpis unuavice la germanoj kaj aŭstroj? Aŭ ĉu ĉiuj iel kulpis? Ĉu la grandpotencoj kvazaŭ somnambuloj lasis sin entiri en la katastrofon?


La nuna jaro estas la centa post la milita finiĝo. Estas nova okazo por memorigi pri la civiliza rompo, kia oni ofte karakterizas la Unuan Mondmiliton, sed samtempe pri la klopodoj restarigi novan mondon post la katastrofo. La esperoj en 1918 nature direktiĝis al la malnovaj movadoj de pacifismo kaj internaciismo. Tial nia rigardo koncentriĝu al la Esperanto-movado, kiu tre proksimis al tiuj movadoj.

ANTAŬMILITA OPTIMISMO

Sed ni unue revenu al la antaŭmilita tempo. Stefan Zweig en sia aŭtobiografio postmorte aperinta en 1942 malgaje memoris, ke tiam regis atmosfero de optimismo. Lia libro *La mondo de hieraŭ* abunde rakontas pri la entuziasmo reginta ĝis tuj antaŭ la militeksplodo. “Neniam Eŭropo estis pli forta, riĉa, bela”, Zweig skribis. “Pri barbara regreso, ekzemple pri milito inter la popoloj de Eŭropo, oni pensis same malmulte kiel pri sorĉistinoj kaj fantomoj...” Kun tiu juĝo harmonias la fakto, ke la pozicio de internaciismo tute ne estis malforta antaŭ 1914. Ĝi apogis sin je la evoluo de tekniko, okulfrappe simbolata per la konstruo de la Eiffel-Turo en Parizo. Internaciismo ne plu konsistis el idealismaj, kosmopolitaj vivkonceptoj. La aŭstro Alred Hermann Fried admonis, ke oni nepre ne identigu la internacismon kun “homara kaĉo”, ĉar ĝi bazas sin sur la ekzistantaj nacioj, kies prospero en la moderna mondo fakte dependas de internaciismo. La demando kiel organizi la internacian vivon akiris pli kaj pli da graveco kaj estis vaste diskutata.

Dum la Eiffel-Turo estis konstruata (1887 ĝis 1889) Esperanto faris siajn komencajn paŝojn. Ĝi unuflanke memorigis pri la malnova kosmopolitismo, aliflanke ŝajnis respondi al la bezonoj de la moderna interplektiĝanta mondo. Dum la Monda Ekspozicio en Parizo (1900) Esperanto unuafoje altiris publikan atenton.

La belgo Paul Otlet reprezentis unu ĉeftrajton de la internaciismo antaŭ cent jaroj: la “tutmondan apetiton je internacia scio”, kaj estas nun konsiderata la prapatro de “tuttera teksaĵo”. Li kaj lia amiko-samlandano Henri La Fontaine (Nobel-premiito de



Paul Otlet (1868-1944), la patro de Interreto.

1913) estis la apostoloj de internaciismo. Otlet kreis en 1907 en Bruselo Centran Oficejon de internaciaj institucioj (ekde 1910 Unio de Internaciaj Asocioj). Bibliografiado, kiel parto de la kolektado kaj alirebligado de objektiva scio, estis por li antaŭŝtupo de nova monda socio. Per interŝanĝo kaj kunordigo de informoj, per la sinapogo al dokumentitaj faktoj, li volis pliefikigi la fortojn de internaciismo. Li opiniis, ke katalogi la mondon faciligas ĝian regadon. Otlet intime kunlaboris en sia bibliografia laboro kun la franco Hippolyte Sebert, la plej elstara esperantisto apud Zamenhof antaŭ la Unua Mondmilito. Nur malfrue, antaŭ ĉ. tridek jaroj, la aŭstralia informatikisto Warden Boyd Rayward per doktoriĝa tezo (re)malkovris la signifon de Otlet. Intertempe aperis pluraj studoj pri Otlet, en kiuj ankaŭ lia rilato al Esperanto kutime estas menciita.

La sviso Hector Hodler, la fondinto de UEA, jam tre frue rimarkis la saĝan antaŭvidemon de Otlet. Laŭ ties invito, li komence de 1910 partoprenis la Mondkongreson de Internaciaj Asocioj en Bruselo. Tie, en parolado pri la socia signifo de UEA, Hodler aprobe citis la pledon de Otlet, ke de la “negativa fazo de l’ internaciismo karakterizata per la pacifismo” (celanta al paco je ĉiuj kostoj) necesas transiri al pozitiva fazo, nome al institucie firmigita internaciismo (kiu akceptas la neeviteblon de konfliktoj). En la posta jaro Otlet partoprenis la malfermon de la Antverpena UK kaj esprimis sin entuziasmigita pri la vivanteco de Esperanto. Kvindek da kongresanoj faris postkongresan viziton al Bruselo, kie Otlet bonvenigis ilin. (Li komprenis Esperanton, sed ne parolis ĝin.) Poste unu kongresano entuziasme raportis pri la bibliografia instituto: “Jam 3.200.000 slipoj estas katalogitaj kaj ordigitaj en tirkestoj ... Estas mirinde kiel facile kaj rapide oni sukcesas trovi el tiu amasego

da dokumentoj tiun, kiu interesas.” La citaĵo siavice iomete dokumentas la “ŝton-epokon” antaŭ Interreto.

Esperantistoj kaj internaciistoj kune helpis la formiĝon de kultura internaciismo. Tion montris ekzemple la Raskongreso en Londono (1911) kun siaj pli ol mil partoprenantoj. Zamenhof submetis al la kongreso memuaron, kiu iĝis konata sub la titolo *Gentoj kaj lingvo internacia*. Ne estas klare, kiom da reeĥo ĝi havis, sed laŭ raporto en gvida usona sociologia ĵurnalo (1912), multaj partoprenantoj opiniis, ke por antaŭenigi internacian kunlaboron internacia helpa lingvo estas bezonata. Historie tamen estas pli signifoplene, ke la Raskongreso montriĝis internacia manifestacio kontraŭ rasa diskriminacio, kontraŭ koloniismo, kaj ke la kongreso akceptis deklaron pri homaj rajtoj.

En la revuo de UEA aperis esperantigitaj kontribuoj de Otlet (en majo 1910 la unua) kaj La Fontaine, krome de Alfred Hermann Fried kaj aliaj. Temis pri diversaj aspektoj de internaciismo, al kiu plej detale dediĉis sin Hector Hodler. Foliumante en la jarkolektoj, ni estas impresitaj de la ĝisfundemo kaj seriozeco, per kiuj famaj internaciistoj kaj la gvidaj esperantistoj traktis la demandon de la monda organizo.

Internaciismo ne povis tiagrade progresi, ke ĝi prezentu defion al la ekzistanta ŝtataro kaj malhelpu la militon. Hodler jam en 1913, en la Berna UK, aludante al la ĵus okazintaj du balkanaj militoj en 1912/13 (kun iliaj “etnaj purigoj”), antaŭtimis pri “la fantomo de pli ampleksa milito”.

IDEOJ PRI PACO

La milita katastrofo detruis la pacifisman movadon. Pereis ankaŭ la kredo pri sci-enca internaciismo. Ĝiaj ĉefrepresentantoj estis la franco Louis Couturat kaj la germano Wilhelm Ostwald, kiuj apartenis al la du ĉefaj antagonistaj milit-potencoj. Ili unuavice celis fortikigi la internacian signifon de sia respektiva nacia lingvo kaj verŝajne ne konsciis la kuriozan kontraŭdiron, kiun entenis tiu celado. Couturat, kiu per Ido celis levi la prestiĝon de la franca lingvo, akcidente mortis komence de la milito, sed lia germana konkuranto Ostwald senlace emfazis la kreskantan gravecon de Germanio en scienco kaj, antaŭe varbinte por Esperanto kaj Ido, en 1916 komencis propagandi propran projekton “Weltdeutsch”.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



En 1986 okazis io preskaŭ revolucia en Esperantujo: la sonkasedo *Tute ne gravas* de la rokbando *Amplifiki* signis la naskiĝon de l' moderna junulara muzika kulturo. Post 32 jaroj la legenda albumo revenas en bita formo (vd. p. 62).

La galoŝoj

Fragmento el verko de Gajaz Iŝhakov

La tatara verkisto Gajaz Iŝhakov, ankaŭ Iŝhaki (tatare Ĝayaz İshaqiy, 1878-1954), naskiĝis en la vilaĝo Jauŝirma (Kazana gubernio, Ruslando) en la familio de mulao. Li lernis en religiaj lernejoj kaj en instruista lernejo, poste instruis geografion kaj historion en la religia lernejo en Orenburgo, dum kelka tempo anstataŭis sian patron kiel imamo. Sed li rompis la familian tradicion kaj forlasis la religian kampon por dediĉi sin al literaturo kaj ĵurnalismo.



Iŝhaki estis kunorganizanto de la socialista tatara partio, kaj pro sia politika agado li estis ekzilita al Nord-okcidenta Ruslando, de kie li fuĝis al Turkio. Seniluziiginte pri la turka socio, li revenis al Ruslando. En 1913-18 Iŝhaki gvidis eldonejon kaj redaktis tatarajn gazetojn en Moskvo kaj Peterburgo. En la Tatara Registaro, fondita fine de 1917, li gvidis komisionon pri la eksteraj politikaj rilatoj. Li aliĝis al la ideo pri unuiĝo de ĉiuj tjurkaj popoloj de Ruslando en nacia-kultura aŭtonomio.

En 1920 Iŝhaki forlasis Ruslandon kaj okupiĝis pri politika agado inter tjurkaj elmigrintoj en kelkaj landoj de Eŭropo kaj Azio. En 1939 li definitive ekloĝis en Turkio, kie li mortis en 1954.

La verkoj de Iŝhaki estis tre popularaj inter liaj samtempuloj. Iŝhaki realisme prezentis la tataran vivon, precipe la medion de imamoj, islamaj studentoj kaj komercistoj. Unu el liaj verkotemoj estis amo kaj geedzeco. En 1903 li verkis sian sensacian antiutopian verkon *Malapero post 200 jaroj*, en kiu li priskribis la morton de la lasta tatara en Kazano en 2103.

La plej konataj dramoj de Iŝhaki *Zulejĥa* kaj *Instruistino* estis surscenigataj en tataraj teatroj eĉ post lia elmigro ĝis 1923, kiam liaj verkoj estis malpermesitaj pro lia kontraŭsovetista agado. Nur en 1992 *Zulejĥa* estis denove surscenigita en la Tatara Akademia Teatro.

La suba traduko aperis en *Orienta Almanako*, eldonita en Moskvo kiel literatura aldono de *La Ondo de Esperanto* por 1913. 105 jarojn poste *La Ondo* donacos jarfine al ĉiu abonanto ekzempleron de la bitlibto *Orienta Almanako*.

Halina Gorecka

Ricevinte la monon, instruisto Nasiro ĝoje eliris straten kaj en la poŝo de lia pantalono agrable tintis la arĝentaj moneroj. Nun, – li pensis, – mi povos aĉeti novajn galoŝojn, ĉar jen en la malnovaj galoŝaĉoj estas truo kaj en ili la kota akvo sonigas: “ĉekert!”, “ĉekert!” plej diverstone. Nasiro palpante en la poŝo la monon sin dorlotis per la penso, ke jen li tuj aĉetos en butiko la novajn galoŝojn kaj tial li rapide marŝis al la bazo. Jen marĉeto. Li povis elekti alian vojon, tamen li decidis iri rekte tra la marĉeto por montri sian kuraĝecon. Malrapide li tratanĉis galoŝe la kotakvon de unu bordo ĝis la alia. Atinginte la sekan teron, li rimarkis, ke akvo fluetas el ĉiu truo

de la galoŝoj kaj dum la marŝado ili kvazaŭ oscedas, kvazaŭ stertoras, kvazaŭ ĝemas agonie. Nasiro bonege, intime konis ĉiun trueton en la galoŝoj: kiel per pumpilo fluas akvo el la trueto sur la “vizaĝo” de la galoŝo; kiel el fonteto ŝprucas akvo el-sub la kalkano, kaj la piedoj malsekiĝas, malpuriĝas. Sed nun venis la tago de l’ venĝo! Tuj la tri rubloj en la poŝo liberigos lin kaj li povos forĵeti la tedintajn galoŝojn. Rapi-de, pli rapide al la bazararo! Ho, malbenitaj galoŝaĉoj, nun mi venĝos al vi. Marŝante al la bazararo en la fenestro de iu magazeno li vidis grandegan reklam-galoŝon kaj li ridetis: ho, bonvolu atendi iomete, tuj mi aĉetos. Jam ĝuante la venkon, li iris pluen, repalpante per la mano sian monon: “Ĝi estas mia mono, – li meditis, – mia propra mono, kiun mi ricevis de miaj tri lernantoj: dum unu monato mi instruis ilin kaj ĉiu pagis po unu rublo”. Nun li havas la eblon akiri galoŝojn tre varmajn, tre molajn; ili forgesigos lin pri la pasinta suferado kaj li sentis, kvazaŭ li jam promenas en novaj oportunaj galoŝoj. Vera paradizo!

Li eniras en galoŝ-magazenon, la revo realiĝas. Li aĉetas novajn galoŝojn, li “engaloŝiĝas!” La malnovajn galoŝojn oni envolvas per papero, li prenas ilin kaj foriras el la magazeno. Kiel plezure estas, kiel agrable. Ho, se ĉiu homo posedus la novajn galoŝojn, la ideo de l’ tutmonda feliĉo estus efektivigita. Ho ve al persono ne havanta sekajn galoŝojn! La bone vestita piedo influas ja la tutan korpon, kvazaŭ la piedoj administras la kapon, kvazaŭ ne la kapo nun revas kaj pensas, sed la piedoj mem tion faras. Nasiro, paradante tra la strato, sentis sin kiel venkinto-triumfanto. Pense li parolis al la stratmarĉo: “Jes! Tiel! Nun vi ne povas malpurigi miajn piedojn, ne, neniel! La galoŝoj kostas ducentdudekkvin kopekojn! jes!” Sed ĝuste tiumomente li eksentis, ke malpura akvo gutas sur lian veston: la malnovaj galoŝoj malsekigis la paperon, per kiu ili estis envolvitaj! Nelonge pensinte, Nasiro venĝe ĵetis ilin en la apudstratan rivereton.

En lia poŝo restis sepdekkvin kopekoj kaj li decidis iri al restoracio por tagmanĝi. Trapasante la malpuran Kazanjan fojnbazaron li estis fiero kaj aspektis simile al generalo, okupinta la sieĝitan fortikaĵon: ĉiu tatara komercisto tuj cedis al li la vojon, rimarkante la brilon de l’ novaj galoŝoj.

Gravmiene Nasiro eniras en la restoracion kaj ĉe la pordo vidas surskribon “*Bonvolu demeti galoŝojn*”. La surskribo ŝajnas esti nelogika, ridinda, tamen Nasiro obeis, nevolonte restigis la galoŝojn en la antaŭĉambro kaj eniris en la manĝosalonon. Kun granda apetito li formanĝis sian porcion kaj rapidis eliri por ree ĝui la belajn galoŝojn. Kie do ili estas? Li serĉas en la galoŝĉambro, li serĉas, li serĉadas kaj ... ne trovas. La pordisto ankaŭ serĉas... vane. La klientoj de la restoracio foriras unu post la alia kaj en la galoŝĉambro restas neniuj galoŝoj. La lasta espero estas perdita! Sen galoŝoj Nasiro sin direktas hejmen tra la kota fojnbazararo, elektante pli sekan vojon. Jen unu piedo trafis en akvon, la botoj tute malsekiĝis kaj ĉagrene la malfeliĉa Nasiro ekĝemis: “Ho! galoŝoj! galoŝoj!”

Tradukis el la tatara lingvo **Jusuf Kazakov**
Kuzneck

Talento kaj gusto

Ĉu vi jam rimarkis? Ĉi-jare ne okazis atribuo de Nobel-Premio por literaturo. Jes! Ĉu vere mankis al ni la daŭra divenado de eblaj kandidatoj? Neniu preteratento de Haruko Murakami. Ili jam ne plu bezonas preteratenti Philip Roth, alian eternan favoraton kiu mortis en majo. Sed Ngũgĩ wa Thiong'o ankoraŭ vivas, do se sekvajare la Akademio regajnos sian reputacion, ili povos tiam neglekti lin denove.

Kio okazis? En 2017 la plej granda sveda mate-na gazeto *La Novaĵoj de la Tago* intervjuis plurajn virinojn pri ĉikanoj kaj perfortoj de iu "Kulturprofilo". Baldaŭ montriĝis, ke temis pri Jean-Claude Arnault. Arnault en si mem ne estas grava persono de la sveda kulturo, pli organizanto ol kreanto. Li administris la kulturcentron "Forumo – Nuntempa Loko por Kulturo" kune kun sia edzino verkistino Katarina Frostenson, ano de la Sveda Akademio. La Akademio finance subvenciis Forumon – do eblas suspekti korupton. Krom la financa helpo por tiu Forumo estas akuzoj, ke Arnault antaŭ la oficiala anonco jam flustris la nomon de laŭreatoj al siaj amikoj. Tiel ili povis veti por la ĝusta kandidato ĉe vetperistoj.



Jean-Claude Arnault

La Akademio esploris kaj debatis la kazon de Frostenson kaj decidis ne eksigi ŝin. Frostenson argumentis, ke oni ne punu ŝin pro laŭdiraj deliktoj de ŝia edzo, tamen poste ŝi forlasis sian akademian seĝon. Pro la neeksigo de ŝi tri akademianoj kaj la konstanta sekretariino ankaŭ proteste forlasis siajn seĝojn en la Akademio. Rezulte la Akademio estis blokita, ĉar pro manko de partoprenantaj membroj ĝi ne povis fari decidojn.

Jam en 2007 la verkistino Maja Lundgren aludis en la romano *Kuloj kaj Tigroj* en apenaŭ kaŝita maniero al perfortoj fare de Arnault. Tie li aperas kiel "Jean-Claude Sen Kompato". La 1an de oktobro kortumo kondamnis Arnault pro unu perfortigo (en la komenco estis 18 akuzoj!) al dujara prizono. Pro apelacioj la verdikto ankoraŭ ne estas valida.

Tio montras la tendencon en la nuna debato pri #MiAnkaŭ. La akuzato estas kulpa ĝis lia senkulpeco estas pruvata sen ajna racia dubo. Dume ĉiuj farse kirlis la kaĉon. Speciale la inista flanko ĉirkaŭ la nun eksa konstanta sekretariino estis sufiĉe agema. La demando estas nun, ĉu eblas ripari jam okazintan damaĝon.

Jam antaŭe la Akademio havis siajn skandaletojn. Trifoje ĝi premiis siajn proprajn membrojn (1916 Verner von Heidenstam; 1951 Pär Lagerkvist; 1974 Harry Martinson kaj Eyvind Johnson). Interalie, pro la posta debato pri tio Martinson mortigis sin en 1978. La akademiano Erik Axel Karlfeldt rifuzis esti laŭreato kaj ricevis la premion post sia morto en 1931.

Ŝajne la centro de la tutmonda literaturo estas en Svedio. Svedaj verkistoj ricevis la premion pli ofte ol azianoj. Horace Engdahl, tiama sekretario de la Akademio, kuraĝe konfirmis publike sian antaŭjuĝon, deklarinte ke la plej grava mondliteraturo ankoraŭ verkiĝas en Eŭropo (legu pli en *La Ondo de Esperanto*, 2008, №12).

Kun tiaj kriterioj ili kompreneble foje kaj refoje miselektas premiitojn. Tro ofte ili elektis laŭreatojn aŭ laŭ iu portempa modo aŭ por fari politikan komenton. Tiu tradicio komenciĝis jam en 1901 ĉe la unua premiado. Preskaŭ ĉiuj kulturanoj de Svedio tiam kritikis la elekton de Sully Prudhomme (ĉu vi iam legis eĉ unu linion de ties verkoj?) Neniam ili eĉ konsideris Tolstoj, Joyce, Proust, Rilke, Musil, Ibsen aŭ Strindberg. Sed ili ja trovis la skribaĵojn de Elfriede Jelinek premiinda (legu pli en *La Ondo de Esperanto*, 2004, №12). Knut Ahnlund proteste forlasis la Akademion, ĉar li opiniis, ke tiu elekto neripareble lezis la reputacion de la Premio.

En 1989 ajatolo Khomeini mortkondamnis per “fatvo” la verkiston Salman Rushdie. Tiam la Akademio ne reagis, ĉar ĝi ne volis “enmiksiĝi en politikaj aferoj”. Pro tio du akademianoj ĉesis partopreni en la kunsidoj de la Akademio.

Tiuj skandaloj kaj skandaletoj rapide falis en la puton de forgeso sen solvo de la veraj kaj evidentaj problemoj de La Akademio. Ĝiaj membroj akademias dumvive. Rezigno ne eblas laŭ la statutoj de 1786. Horace Engdahl, iama konstanta sekretario foje rakontis pri antaŭulo, kiu oficis dum 38 jaroj, fine blinda kaj senila, sed tamen li plenumis sian taskon brave kaj senplende. Aliaj diras, ke la plej grava kapablo estas majstrado de la svedaj kortumaj ceremonioj. Kiel tiu asembleo povas decidi pri nuntempa monda literaturo? La Akademio devas renovigi kaj rejunigi sin.

Aŭ ĉu elektu tute alia korporacio? En 2018 la tiel nomata Nova Akademio donis Alternativan Literaturpremion al Maryse Condé, franclingva verkistino kun radikoj en Karibio. Kompreneble iu ajn povas doni ajnan premion al ajna verkisto. Eble tiu premio estus pli alternativa, se ĝi ne estus aranĝita kiel parodio de la “vera” premio.

La problemo ne estas, ke la edzo de iu akademianino kaj la usona prezidento, havas la hobion preni virinojn “ĉe la piĉo”. La problemo estas, ke ni nun vidas, ke ankaŭ tiuj geakademianoj malantaŭ siaj fermitaj pordoj ne estas mondĉampionoj de idealismo, sed ordinaraĵoj homoj, organizantaj sin en klikoj, atendantaj personajn avantaĝojn, envidplenaj, kverelemaj kaj egoistaj. La akademianoj ne plu povas agi kiel superuloj en nia percepto, sed estas kiel vi kaj mi. Jes, la imperiestro estas nun nuda.

La laboro de la Akademio pri la sveda lingvo estas kaj restas laŭdinda, malgraŭ tio, ke la internacia publiko ne atentis tiun flankon de ĝia laboro. Eble ĝi iam povos regajni la fidon de la publiko por denove atribui la Nobelan Premion. Eble la Akademio fenikse renaskiĝonta povos denove puŝi la karuselon de taŭgaj kaj ne-taŭgaj kandidatoj. Jes, certe ili neniam premios reputaciplenajn verkistinojn de krimromanoj el Nepalo. Tamen la plej grava aspekto de tiu ankoraŭ plej grava literaturpremio de la mondo estas: montri al la mondo, ke literaturo gravas.

Wolfgang Kirschstein

Serena krimromano

Modest, Julian. *Serenaj matenoj*: Krimromano, originale verkita en Esperanto / Antaŭparolo de Petar Todorov. – [Antverpeno]: Eldonejo Libera, 2018. – 95 p.

Mi ankoraŭ estas nova esperantistino kaj ne ĝisfunde konas nian literaturon. Tamen eĉ nova leganto de Esperanto rapide rimarkas la nomon Julian Modest, ĉar li senĉese publikigas novajn verkojn. Scivoleme rigardante la liston de liaj verkoj, mi miris ne nur pri la kvanto, sed ankaŭ pri la daŭro de la produktado – pli ol tridek jaroj – kaj la diverseco – verkoj el ĉiuj ĝenroj.

Mi demandas min, al kio utilas recenzo. Miaopinie, ĝi devas sciigi, kia estu la legontaro de la pritraktata libro. Neniu libro povas plaĉi al ĉiuj. Ekzistas libroj, verkitaj kun granda lerteco en eksperimenta maniero per kompleksa vortotrezoro. Tiaj libroj plezurigas la plej spertajn legantojn, t. e. la eliton de nia movado.

Ne tiaj estas la libroj de Julian Modest. Neniel li dediĉas sian verkadon al elito, sed male al la plimulto. En tio li pravas. Multaj el ni en la movado ne ege spertas, tutsimple ĉar maloftas la okazoj praktiki la lingvon. Mankas tempo por legi longajn verkojn. Malagrablas, kiam dum la legado necesas ĉiam konsulti vortaron, cerbumadi pri ĉiu frazo, strebi memori komplikajn skemojn kaj okazintaĵojn. Se vi ofte alfrontas tion, ne hezitu legi la librojn de Julian Modest. Tio ne signifas ke lia verkado estas malaltnivela. Tute male. Kiel konscias ĉiu kreanto, la simpleco estas celo malfacilege atingebla.

Serenaj matenoj estas la plej nova krimromano de Julian Modest. Ĝi estas mallonga, bone presita per facile legeblaj literoj. La kovrilo estas bela kaj la titolo videblas sur ĝia dorso (se la eldonisto forgesus tion, la libro iel malaperus, kiam ĝi staros inter aliaj libroj sur breto). Ankaŭ la cifereca versio bone legeblas danke al la laboro de la eldonisto.

La rakonto okazas dum agrabla suna aprilo en la nuna epoko. La ago estas en ĉemara kvieta urbeto. Verŝajne, ĝi kuŝas en Bulgario, la lando de la aŭtoro, proksime de la haveno Burgas (Burgo en la romano). La balkana karaktero sentebblas en la nomoj de la roluloj kaj en kelkaj kutimoj, ekzemple nomi virojn “onklo” kaj virinojn “onklino”.



Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



En aŭtuno (ĉu ankaŭ ĉe niaj sudaj antipodoj?) komenciĝas la lernojarro. Lernado ja estas serioza afero, sed inter la lecionoj oni povas iom petoli, kaj ankaŭ dum lecionoj en la klasoj okazas amuzaj epizodoj – vidu la sekvan paĝon. Sendu ŝercojn el via lando!

Solvo por la oktobra krucenigmo

Por la krucenigmo, publikigita en la oktobra numero de *La Ondo*, venis kvar respondoj, (preskaŭ) ĉiuj ĝustaj (unu respondinto faris solan eraron). Ilin sendis Bruno Lehtinen (Finnlando), Edeltraut Henning (Germanio), Dorota Burchardt, Zbigniew Tylkowski (Pollando).

La ĝustaj respondoj: 1. Monako; 2. Olimpo; 3. likeno; 4. Denebo; 5. peonio; 6. maorio; 7. kanopo; 8. dekanio; 9. knarad'; 10. hedero; 11. dafnio; 12. korizo; 13. klingo; 14. glukoz'; 15. pinglo; 16. epilogo'; 17. sandro; 18. angloj; 19. plonĝo; 20. kokono.

La loto donis libropremion al **Dorota Burchardt**, kiun ni gratulas!

Dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Foje en lernejo

Luĉjo demandis la instruistinon en leciono de la rusa lingvo: “Maria Ivanovna, kial ni lernu la rusan lingvon, ja la serĉilo egale ĉion komprenas?”

Sur la bildo estas biskvito, ŝtrumpeto kaj ĉokolado. La instruistino demandas la klason: “Infanoj, kiu objekto estas superflua sur la bildo?”

Manjo respondas plej unue: “Ŝtrumpeto! Ŝtrumpeto estas superflua!”

Luĉjo tuj intervenas: “Sencerbulino! Ŝtrumpeto neniam estas superflua, ĝi estas ĉiam serĉata!”

Instruisto: “Ludoviko, kion signifas la esprimo “kaj tiel plu”?”

Lernanto: “Ĝi estas kreita speciale por tio, ke aliaj homoj pensu, ke vi scias pli multe, ol vi efektive scias”.

Anonco sur la pordo de lerneja biblioteko: “Estimataj lernantoj! Turnante sin al la bibliotekisto, penu rememori ne nur la koloron kaj la amplekson de la postulata libro, sed ankaŭ ĝiajn titolon kaj aŭtoron!”

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Nemoskovskaja**



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Nur stultuloj gapas plu

Ĉiu inteligenta esperantisto jam komprenis ke la Esperanta Civito proponas alternativan modelon de organizado al nia diaspora lingva grupo... (Giorgio Silfer, konsulo; <http://www.esperantio.net/index.php?id=3628>)

Civilaj militistoj ne malhavu civitan ideologion

La selektado okazas per formado (administra kaj ideologia), al kiu oni invitas <...> la rekrutojn de Civila Esperanta Servo. (Giorgio Silfer, konsulo; <http://www.esperantio.net/index.php?id=3628>)

Kaj denove la Civito

... la debato montris aliajn eblajn temojn por la estontaj konferencoj. Recivitaj estis multaj proponoj... (Anton Mihelič: La 20a Internacia Esperanto-Konferenco "Alp-adrio" en Bjelovar (Kroatio) // *Eŭropa Bulteno*, 2018, N^o6, p. 6)

Plantoj amon reciprokas

... malofte videblas floroj <...> Eble nur mi rimarkis tion, ĉar mi estas floroŝatata persono. (Neĝeta: Kio estas en la fermita fenestro? // *Teranido*, 2018, N^o6, p. 6)

Ni ĉiuj konas la respondon

Heroldo estas konstruata kaj baldaŭ estos lanĉita. Dume, vi povas legi la PDF-a version kaj ricevi la paperan version en via konrespondadreso. (<http://www.heroldodeesperanto.club>; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Ĉinaj arboj kreskas ĉeflande

Estas evidente, ke en teritorio kiel Hongkongo, Tajvano povas esti aliaj kotizokategorioj ol kiel en ĉeflando Popla Ĉinio. (Dietrich Weidmann, 21 sep 2018, yahoo-grupo komitato-de-uea; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Nek kroĉeti nek krozeti

Renato Kroseti (nomo de aŭtoro en *Montejo*, eldonaĵo de Nepala Esperanto-Asocio, 2018, p. 7; rimarkis Ionel Onet)

Ekzemplego veterana

Ekde 1887 mi partoprenis 23 foje la UK:n, krome aligxis al multaj por subteni la aferon. (Synnöve Mynttinen, <https://www.liberafolio.org/2018/10/04/kial-mi-ne-plu-partoprenos-la-uk-n/#comment-2393>)

Plukis **István Ertl**

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsu, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefareet 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa novembro Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la abonebloj de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>